# ESPERANTO EN AFRIKO

Oficiala bulteno de la Afrika Komisiono de UEA

15-a jaro, n-ro 44(2021:3)


*Karaj legantoj,*

*Por malfermi ĉi tiun novan numeron de la revuo, ni revenas al la afrika diplomito de UEA pri Elstara Agado 2021. Ni poste prezentas pri aktivaĵoj dum la ĵus lastaj monatoj en Afriko, kun fokuso pri la verdaj movoj en Burundo, DR Kongo, Tanzanio, Togolando kaj Zimbabvo, sen forgesi pri la Interncia Semajno pri Amikeco, kunvenoj de virinoj, invito de Senegalo por la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) jar-fine 2022, alvoko de la Afrika Komisiono de UEA pri projektokreado kaj fine pri subita forpaso de konata konga esperantista muzikisto, nome Théophile Mayoma Diankembo.*

*Bonan legadon al vi!*

***La redakcio***

*****************

## Nova distingo por Elysée Byelongo

**La nuna kunordiganto de la Afrika Komisiono, d-ro Byelongo Elisée Isheloke, estas unu el la honorigitoj de UEA per diplomo pri Elstara Agado 2021. Distingo, kiu rekonas liajn agadojn kaj klopodojn favore al Esperanto en Afriko.**


UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO | EN OFICIALAJ RILATOJ KUN UN KAJ UNESKO

DIPLOMO PRI ELSTARA AGADO

PER TIU ĈI DIPLOMO UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO PREMIAS

Elysée I. Byelongo

PRO ELSTARA AGADO POR LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO.

2-A VIRTUALA KONGRESO (VK) DE ESPERANTO, LA 24-AN DE JULIO 2021.

DUNCAN CHARTERS
PREZIDANTO DE UEA

*Estas granda honoro, ke finfine nia Movado agnoskas mian agadon por Esperanto. Mi dediĉas tiun premion al miaj studentoj, el kiuj multaj fariĝis fervoraj esperantistoj, al miaj geamikoj ĝenerale – aparte al Mateso Bilimba, kiu ekinstruis min pri Esperanto, kaj Hans Bakker, kiu daŭrigis la instruadon al mi – kaj mia familio, kiu subtenas min en mia sindediĉo al Esperanto, kaj al Sud-Afrika Esperanto-Asocio, kies dumviva membro mi estas. Tiu ĉi premio estas ankaŭ por amikoj, kies nomoj ĉi tie ne estas menciitaj. Al ĉiuj mi elkore dankas pro konstanta subteno. Kiom ajn longa estas la nokto, tagiĝas. Mi dankas al Universala Esperanto-Asocio pro tiu mia premio, kio valoras je miaj okuloj pli ol erco,* tiel esprimis sian feliĉon la nova diplomito en la kontinenta diskutlisto la 25-an de julio 2021.

Elysée Byelongo elstariĝis pro la elstara agado kiel unua afrika esperantisto, kies doktoriĝa tezo havas sekcion pri Esperanto, kaj kiel kreinto de E-kluboj en Najrobo, Zimbabvo kaj Tanzanio, inter ili la Klubo de Paco kaj Frateco, kadre de kiu li instruis la lingvon al centoj da rifuĝintoj en la Tendaro Nyarugusu, inter 1996 kaj 1998.

Aliaj afrikanoj ricevintaj lastatempe la saman distingon estas la benin-kanadano Jean Codjo, togolandano Adjévi Adjé en 2016 kaj tanzaniano John E. Magessa en 2020.

**Adjévi Adjé**

# *La Espero*, Esperanto-forcejo en Burundo



Danke al multflankaj subtenoj de BAVELO, organizo ene de Germana Esperanto-Asocio, la Esperanto-domo de Rumonge, Burundo, sukcesis, sub la nomo *La Espero* malfermi kaj akcepti ĉe siaj infanĝardenoj 1 kaj 2 entute 30 infanojn dum la lernojaro 2020-2021, kiu finiĝis en la pasinta julio. La infanoj, kiuj frekventis *La Espero*, venis multe pli de malriĉaj familioj de Rumonge. Tiuj ĉi ne povis sendi siajn infanojn al aliaj infanĝardenoj, ĉar tie la lernokotizoj multekostas.

Dum la tuta lerno-jaro la infanoj ricevis edukadon en la franca, svahila kaj kirundi. La 28-an de junio 2021, la lastan tagon por ekferii, okazis kunveno kun la gepatroj de la infanoj, instruistinoj, membroj de la estraro de la landa asocio ANEB, nome Pamphile kaj Hassan, kaj aliaj du e-istoj Benjamin kaj Thadee en la granda halo de nia E-centro. Ĉiuj venis por partopreni la ceremonion pri diskonigo de la jarfinaj rezultoj al la 30 infanoj. Estis granda kaj grava momento por ĉiuj. La ĝeneralaj rezultoj montris, ke la infanoj faris bonan progreson dum la tuta lerno-jaro.

La gepatroj de la infanoj dankis la estraron de ANEB, kiu pripensis malfermi infanĝardenon en la kvartalo Kanyenkoko, unu el la malriĉaj de Rumonge. Ili ĉiuj ĝojis kaj fieris pri la aspekto de nia centro kun diversaj ludiloj je la dispono de iliaj infanoj. Iuj el ili eĉ asertis, ke la centro havas bonan estontecon, dum aliaj ankoraŭ petis instruadon de Esperanto al la infanoj, ĉar ili sciis kaj vidis propraokule tion, kion ni faras pere de Esperanto.

Menciindas, ke en tiuj atingoj de *La Espero* ludis gravan kaj ŝloŝilan rolon laste la asocio BAVELO. Per ĝia helpado konstruiĝis novaj klasĉambroj en la centro kaj ĉiuj infanoj tie povis ricevi regule manĝojn ĉiusemajne. Koran dankon al BAVELO! Sed malfacilaĵoj ankoraŭ estas, kaj tial ni petas al esperantistoj plu subteni nian vartejon, ĉar ĝi estas bona maniero montri la bonfarojn de Esperanto al la gepatroj de la infanoj kaj per tio semi la verdan semon en la kapon de la infanoj mem.

Kelkaj el la problemoj de *la Espero* kuŝas en tio, ke: a) multegaj gepatroj volas, ke iliaj infanoj estu akceptitaj en la centro, b) la kotizoj de gepatroj sufiĉas apenaŭ por pagi la instruistinojn, c) multaj gepatroj ne povas pagi la lerno-kotizojn de siaj infanoj, kaj tio multe bremsas la bonan funkciadon de la centro, ĉ) kvankam ni planas malfermi E-instruadon dum la lernojaro 2021-2022, ni ne disponas sufiĉajn rimedojn por pagi la volontulon, kiu venos instrui la lingvon al la geinfanoj. Alivorte, *La Espero* urĝe bezonas E-librojn por infanoj kaj monsubtenon de E-organizoj, precipe de UEA, por efike funkciigi la E-instruadon.

**Aimé patrick Manirakiza**

**Ĉu vi scias, ke eblas aliĝi al Univerla Esperanto-Asocio kaj pagi nur 2 EUR (landkategorio 1) por tuta jaro kaj profiti la retajn servojn de la asocio?**
Bela okazo por membriĝi en UEA, ĉu ne?
Nu, vi estas bonvena inter la membroj de UEA! Bonvole informiĝu ĉe via landa peranto (se tiu ekzistas) pri la transpago de via aliĝkotizo aŭ ĉe *https://uea.org/alighoj/alighilo* aŭ pri pagmanieroj: *https://uea.org/alighoj/pagmanieroj* aŭ rekte skribu al: *adjevia@gmail.com*

# Nova Esperanto-Klubo en Shanje, DR Kongo




Esperanto estis nekonata en Kalehe, distrikto de Sudkivuo en la orienta parto de DR Kongo. Nur la franca kaj la angla estis fremdaj lingvoj lernataj en la lernejoj de tiu vilaĝo. Necesis do, ke iu vojaĝigu Esperanton al tiu regiono, kiu longtempe estis sub malsekureco, sed nuntempe retrovis serenan situacion.

En marto 2015, s-ro Chancelier Havugimana Bwicha de Shanje (Kalehe) vizitis Rutshuru. Li bonŝancis ekscii kaj akiri de Joel Muhire bazajn nociojn pri Esperanto dum sia surloka restado. Reveninte hejmen, li informis pri Esperanto al siaj kamaradoj, sed mankis al li sufiĉa tempo por ekinstrui ĝin en klubo.

Kadre de la kampanjo Hans Bakker fare de la Afrika Komisiono de UEA, instiganta ĉiujn kapablajn afrikanojn prizorgi perretan E-instruadon dum tiu ĉi pandemia periodo, Joel Muhire, male, vojaĝis la 18-an de septembro 2021 al Shanje por starigi fizikan klubon en tiu montara vilaĝo. Duonvoje inter Masisi, Norda Kivuo kaj Kalehe, Suda Kivuo, li aŭdacis piedvojaĝi en malsekureca regiono tutan tagon. Temas pri serpentuma kaj longega vojo. Joel Muhire ripozis du tagojn ĉe Chancelier. La 21-an de septembro, li kunvenigis junulojn interesatajn pri Esperanto kaj parolis al ili koncize pri la lingva historio. La bazaj nocioj, kiujn li instruetis al ili, montris kiom Esperanto estas pli rapide lernebla ol ajna lingvo. Tio vekis ĉe la gejunuloj ardan deziron pli lerni Esperanton. Bedaŭrinde analfabetoj, kiuj partoprenis kun ni, nekapablaj skribi eĉ siajn nomojn, forlasis nin. Ni registris por la nova klubo 14 virojn kaj 1 virinon krom la analfabetuloj. La nova E-Klubo de Shanje ekfunkciis oficiale post la foriro de Joel Muhire, la postan tagon. Certe la klubo iom post iom kreskos forte kaj pli firme.

Nun ĝi estas kvazaŭ burĝonanta semo, kiu bezonas flegadon por kreski. Joel M. donacis al ĝi kelkajn sed ne sufiĉajn librojn, revuojn, du *Poŝamikojn* kaj insignojn. Pliaj Esperantaĵoj kiel *Cours rationnel d'Espéranto, dictionnaire pratique, dictionnaires de poche,* Esperanta flago, revuoj kaj legolibroj estas bezonataj.

Oni bonvole uzu la ĉi-sekvan poŝtadreson por sendi la materialojn al la klubo: **PO BOX 08, Bunagana – Kisoro, Ugando,** kaj la jenan retpoŝtadreson: *chancelierabiru@gmail.com* por sendi kuraĝigajn mesaĝojn al ĝia estro s-ro Chancelier Havugimana Bwicha Abiru.

**Joel Muhire**

# Reveno de Esperanto en Zimbabvo

La volo kaj spirito de afrikanoj plu disvastigi Esperanton en sia kontinento jam ne mortis, malgraŭ malhelpoj en la mondo pro kovimo. Dank' al monsubteno de Julian Cloete kaj de Sud-Afrika Esperanto-Asocio (SAEA), Elysée Byelongo unue prezentis Esperanton virtuale al membroj de la organizo *Women Advocacy Project Trust* en la ĉefurbo de Zimbabvo kaj poste li vojaĝis instrucele al Harareo por fondi tie Esperanto-klubon la 1-an de junio 2021.

Ĉ. 13 personoj, el kiuj estis 10 junaj virinoj, lernis Esperanton por la unua fojo sub lia gvido ĉeesta. La aranĝo surloke estis riĉa kaj varia. Krom kurso kaj serioj da prelegoj fare de ges-roj Konstanco kaj Akenga Mnyaci, estis ludoj, danc-prezentoj laŭ la shona kulturo. La partoprenantoj havis laŭvice la ŝancon praktiki Esperanton per mallongaj konversacioj en formo de dialogo per la libro *Jen nia mondo*. Estis vera momento de lernado, sed ankaŭ de ĝojo kaj amuziĝo! Ĉe la fino ĉiuj povis regali sin, kuntrinki kaj fari grupajn fotojn kun belega afiŝo, destinata por la evento.

La nova klubo funkciigas grupon ĉe ŭatsapo per kiu kaj la klubanoj kaj ĝiaj elektitaj gvidantoj estas kunigitaj por daŭrigi la lingvan lernadon distance. Ilia plej grava kaj arda deziro nun estas trovi gesamideanojn tutmonde, kiuj volonte helpos al ili pli praktike flegi siajn bazajn E-konojn kaj ellerni ĝin per korespondaj kursoj. La klubo estas promesplena kaj tial ni helpu ĝin kreski kaj flori!

Ĉiuj interesataj, precipe anglalingvanoj, por gvidi perkorespondan E-kurson al la klubanoj estas ne malpli dankataj. Sinproponantoj bv. kontakti kun Elisée per *ebyelongo@gmail.com*. La klubo ankaŭ bezonas librojn de Esperanto kaj vortarojn, kaj de tiuj lernomaterialoj inkluzive de KD-oj kaj DVD-oj pri Esperanto ĉefe en la angla lingvo al la kluba poŝtadreso legebla sur la afiŝo.

Zimbabvo estas unu el la afrikaj landoj, kiuj iam produktis aŭ havigis fervorajn e-istojn al nia movado. Prof. Oliver Mazodze aktivis tie kun helpo de internaciaj kunlaborantoj kiel Renato Corsetti kaj aliaj. Sed post la morto de Oliver kaj elmigro de aliaj aktivuloj kiel Bernard Londoni al eksterlando, la tiea movado pli kaj pli malfortiĝis ĝis kompleta estingiĝo. Esperantistoj kiel Eric Nyemya Alepembwe kaj aliaj elektis vivi for de la ĉefurbo Harareo sen fari "bruon".

Pormemore, SAEA dum pluraj jaroj ludis pioniran kaj ŝlosilan rolon pri Esperanto en Zimbabvo. Ĝiaj membroj multflanke subtenis ne nur la Esperanto-agadojn, sed ankaŭ unuopulajn esperantistojn tie. Pri tio ĉi prezentas ankaŭ la libro *Historio de la Esperanto Movado en Sud-Afriko kaj ties periferioj omage de Axel von Blottnitz* de Elysée Byelongo. La libro estas mendebla ĉe la Libroservo de UEA kaj ankaŭ ĉe la eldonisto Monda Asembleo Socia (MAS).

**Elysée Byelongo**






# Afrikaj virinoj elpaŝas publike


Esperantista Virina Asocio en Afriko (EVAA) retrenkontiĝis sub la temo *Emancipiĝo de la esperantistaj virinoj en Afriko* kun entute 12 partoprenantoj el DR Kongo, Madagaskaro, Malio, Senegalo, Kanado, Nepalo, Brazilo, Germanio, Belgio kaj Togolando la 29-an de aŭgusto 2021.

La etoso estis bona, interesa kaj aparte pro la kontribuoj de eminentuloj en Esperantujo kiel Ĵajro, kiu proponis al ni pri komerco, Helga Artistino; Heidi Goes parolis pri agrikulturo, Didier Apélété Agbolo (togolanda viro) konsilis nin pri mastrumo de projekto kaj John Huang, elstara E-komercisto, pri bonaj medicinaj ajloj. Ĉiuj intervenis dumkunvene.

La retkunvenoj de EVAA celas roli kiel diskutejo, kie virinoj kaj aliaj interesatoj pri virinaj streboj povas libere interparoli pri emancipaj aspektoj kaj aktivaĵoj favore al bona disvolviĝado de la afrikaj virinoj esperantistaj. La renkontiĝo estas malfermita al la publiko kaj ĉiuj estos bonvenaj aliĝi kaj partopreni. La venonta retrenkoniĝo ĉefteme enfokusiĝos pri komerco.

Tiu ĉi retrenkontiĝo okazis sub mia gvido kaj tiu de Alexandrine Omba. Decide ni, virinoj, volas ekmoviĝi agade pri komerco dum la venonta jaro, ĉar ni kunlaboras unuavice por nia disvolviĝo.

**Miora Raveloharison**




# Alvoko por projektokreado

Tiu ĉi alvoko, al ĉiuj afrikaj esperantistoj loĝantaj en la kontinento, validas ĝis la 30-a de novembro 2021.

Por la interesatoj temas pri invito prezenti konkretajn projektojn, kiuj estas vivo-povaj kaj gajno-povaj ekonomiaj projektoj mastrumotaj de la iniciatinto unuope aŭ kunlabore kun aliaj esperantistoj. La prezentantoj de projektoj devas esti konataj de la komisiono por UEA-agado en Afriko, kiu morale povas garantii, ke ili estas seriozaj kaj honestaj.

Ĉiuj bonvole priskribu kaj sendu siajn konkretajn projektojn al la jena komuna retpoŝtadreso: *afrika.komisiono@googlegroups.com*. Ĉe la sama retpoŝtadreso bonvenas ĉiaj demandoj pri la alvoko.

La komisiono ĝisdatigis sian laborplanon, celante la plifortigon, antaŭenigon kaj pluvivigon de la internacia lingvo Esperanto en la kontinento, kaj ĝi havas, sub la rubriko *Afriko Faras*, apartan fokuson pri ekonomie monenspezigaj iniciatoj, kiuj helpos kaj la projektoportantojn kaj la investantojn gajnoprofiti.

# Senegalo invitas vin jarfine 2022

**Post estingiĝo de la flamo de la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) en Burundo antaŭ preskaŭ du jaroj, venis nun la momento ekflamigi tiun de la 8-a, kies gastiganta lando estas Senegalo. Kontaktoj, laboroj estas diligente farataj por pretigi bonan renkontiĝon.**




La Afrika Komisiono kaj la Kongresa Organiza Komitato invitas vin – kara samideano, kara esperantisto de ajna lando, karaj amikoj kaj amikinoj de Afriko, vin ĉiujn, kiuj pensas, ke ankoraŭ havas sencon kunveni kiel homoj kun homoj en la nuna mondo de multaj problemoj – por veni al la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE). Tiu ĉi kongreso disvolviĝos de la 26-a ĝis la 30-a de decembro 2022 en Tieso, Senegalo.

La kongresa urbo staras oriente de la ĉef-urbo Dakaro kaj tie prepariĝas por vi ĝoj- kaj ĝuoplena semajno. Bonvolu ne preterlasi tiun ŝancon viziti Senegalon! Venante al la kongreso, vi helpos per via ĉeesto surloke montri la diversecon de nia E-movado, kie ĉiu homo povas senti sin sekura en siaj loka kaj persona identecoj, kie ĉiuj hejmiĝas lingvegalece.

Dum la kongresa periodo vi povas malkovri multon, lerni, renkonti ekkonitajn amikojn, amikiĝi kun novaj personoj, amuziĝi. Vi povas ankaŭ sperti la gastamon de lokuloj, la ĉarman belecon de la lando tra komunaj ekskursoj, kiujn ni aranĝos, kaj krome provi tipe lokajn kuirartaĵojn kiel Tiebudien, Jasa kokaĵo ktp. Mallonge, venante al la kongreso, vi ne enuos.

La organizantoj esperas partoprenon aŭ subtenan aliĝon al la kongreso de multegaj esperantistoj el ĉiuj kontinentoj. Bonvolu jam nun plani vian vojaĝon al la 8-a AKE. Tieso ĝojas bonvenigi vin ĉiujn por spertigi vin pri aspektoj de la bunteco kaj riĉeco de la tero Teranga, la hejmo de gravaj personoj kiel Cheikh Anta Diop!

Vi povas per la reta aliĝilo jam enskribiĝi por partopreni la kongreson jarfine 2022 ĉe: *https://afrika.esperantujo.io/8-ake/aligilo*.

Vi povas per mondonaco al la konto Afriko de UEA kontribui al la sukceso de la 8-a AKE. La donacoj estos uzitaj por: a) subvencii la partoprenon al la kongreso de afrikaj gejunuloj, kiuj aktivas por Esperanto, tamen ne havas la monrimedojn, ĉeesti ĝin, b) pagi kompetentulojn por instrui pri konkretaj temoj, ekzemple, redaktado de vikimedio kaj c) subteni ka-pabligan agadon de Senegala Esperanto-Asocio.
Pliaj informoj ĉe: *ake-8-organizantoj@googlegroups.com.*

# Internacia Semajno de amikeco kaj Afriko

En la dato 27 feb. afrikaj kaj alikontinentaj e-istoj markis la apoteozon de la Internacia Semajno de amikeco per renkontiĝo.

La programo, pro la limigoj rilate al la korona viruso, disvolviĝis nur virtuale dum pluraj horoj kun partopreno de dudeko da e-istoj el Afriko, Ameriko, Azio kaj Eŭropo.

Laŭvice la partoprenantoj salutis kaj sin prezentis mallonge. Poste okazis spekto de la filmeto *Bona Amiko*, realigita de Solidareco Bona Volo (SBV) en DR Kongo, bonvenigo nome de Afriko, prezento de memorfotoj pri la 73-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Togolando, mallongaj raportoj de la Afrika Komisiono kaj de reprezentantoj de Burundo, DR Kongo, Senegalo, Togolando pri E-aktivaĵoj en la respektivaj landoj.

Siavice, Elisabeth Schwarzer gvidis diskutrondon pri la delegita reto de UEA, Iván Mättig C. faris prezenton pri fruktodona amikeco pere de leteroj tra la mondo kaj d-ro Keyhan Sayadpour pri siaj sciencaj agadoj en Afriko.

Oni povis interalie ankaŭ aŭskulti vivavoĉe kantoprezenton de Joel Muhire, rigardi koncerteton de Zhou Mack kaj ankaŭ balafonan muzikon kun dancado de la neesperantista grupo Kanouya.

Menciindas, ke la ideo fari agadon kadre de la Internacia Semajno de amikeco venis de Claude Nourmont, kiu mem ne nur partoprenis, sed ankaŭ kontribuis per klarigoj pri aspekto de levitaj demandoj de partoprenanto.




La tago entute estis okazo por ni afrikanoj kontakti kun alilandanoj, interŝanĝi, babili en amikeca etoso kun ili. Ĝi estis tute interesa sperto ankaŭ por ĉiuj, malgraŭ kelkaj teknikaj problemoj ĉe la eventofino.

Tamen, pli ol unu partopreninto retrorigarde per retpoŝtaĵo faris rimarkojn, kiuj povus utili por ontaj elpaŝoj, ĉar la Afrika Komisiono kaj afrikanoj mem interesiĝas daŭrigi la vojon pri virtualaj Esperanto-programoj en la kontinento.

Dankon al ĉiuj partoprenintoj, kontribuintoj al la realigo de la tago. Apartan dankon al Jung Yuro „Unika", kiu volonte kunlaboris pri la teknika flanko. Ŝi bone kaj helpeme agis en la t.n. babilejo. La registraĵon pri la tago oni povas rigardi per: *https://www.youtube.com/watch?v=n5QionSGLAs&t=6492s*

**Adjévi Adjé**

# Premioj al gelernantoj de Instituto Zamenhof (IZo)

La gelernantoj de IZo, kiuj partoprenis la konkurson *Kiom flue* 16 sep. 21, ricevis siajn premiojn ene de la lernejo 30 sep. 21.

Ĉiuj 21 konkursintoj ricevis E-aĵojn. Poste, 5000 FXOF (ĉ. 8 eŭroj) iris al ĉiu el la dek elektitoj inter la 21 partoprenintoj. S-roj Doumegnon Koffi kaj Attaglo Kokou Evienyeame, helpataj de la geinstruistoj de IZo, zorgis pri tiu disdono de premioj.

**Gbeglo Koffi**



## **Karitate** en Goma

Dum kelkaj tagoj la kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA, d-ro Byelongo Elisee Isheloke, partoprenis kun helpo de la evangelisto Samy en disdonado de vestaĵoj al viktimoj de la vulkano Nyiragongo en Goma, oriente en DR Kongo.

La vestaĵojn kaj ŝuojn kolektis Elisée ĉe sia eklezio. Estis ankaŭ aliaj aĵoj kolektitaj, sed ĉar tiuj ĉi estis ege pezaj kaj plie ilia veturigo necesigis altajn elspezojn, ili simple estis disdonitaj surloke al rifuĝintoj en Kaburbo, Sudafriko, kaj ankaŭ survoje al Goma.

Tiu ĉi iniciato estas finance subtenita de la kunordiganto de la Afrika Komisiono mem kaj ankaŭ de sudafrika bonkora esperantisto, nome Heinrich. Parto de la financa rimedo ebligis la veturigon de la kolektitaj aĵoj, dum la alia parto estas disdonita al homoj surloke en Goma.

La erupcio de la vulkano Nyiragongo okazis la 22-an de majo 2021. Tio kaŭzis detruon de ĉirkaŭ 3500 domoj en la norda parto de la urbo Goma (san-distrikto Karisimbi) kun kampoj kaj bestoj falĉitaj pro la lafo.







## **Forpasis** Théophile Mayoma



*Saluton, ni informas vin, ke Théophile Mayoma Diankembo forpasis la ĵusan merkredon,* skribis en la franca lia nevino Simpi Zatoko Trésore ĉe mia privata Messenger-konto la 13-an de aŭgusto 2021.

Fakte, tiu ĉi konata E-kantisto mortis pro koratako la 11-an de aŭgusto 2021 en la aĝo de 61 jaroj. Lia entombigo okazis du semajnojn pli poste t.e. la 25-an aŭgusto en lia hejmolando DR Kongo.

Théophile estis multjara membro de UEA. En sia esperantista vivo li kontribuis al la disvastigo de la lingvo ĉefe per muzika kulturo. Li estis verkisto-komponisto kaj muzikisto. Li komencis muzikumi en 1985 kaj havas 2 albumojn. Laste, dum li ankoraŭ vivis, jOmO kaj lia filino Marta  Juliá omaĝis al li per la albumeto *MArta kaj  JOmo kantas MAYOMA-n*.

La forpasinto postlasis nek infanon, nek vidvinon, tamen bonegan muzikan memoraĵon, kiu ja atestas, ke li plu restos en memoroj ankoraŭ por longe.
Li ripozu en paco!

**La redakcio**

***Esperanto en Afriko*** estas trimonata oficiala periodaĵo de la Afrika Komisiono de UEA pri la Esperanto-movado en Afriko.

**Redaktis:** Adjévi Adjé,
06 B.P. 61807, Lomé, Togolando;
tel.: +228 902 57 549, 995 72 623.

Kion faras via landa asocio aŭ via loka E-klubo en via loĝloko? Bonvolu verki kaj sendi artikolon pri tio. La redakcio akceptas ankaŭ fotojn. Bonvenaj komprenehle estas ankaŭ sugestoj, konsiloj, komentoj por la plibonigo de la bulteno al: *adjevia@gmail.com*.

**Limdato por la 45-a n-ro:** la 15-a de novembro 2021.

**Membroj de la Afrika Komisiono de UEA (2019-2022):**

D-ro Byelongo Elisée Isheloke, **Sudafriko**
D-ro Gilbert Niyukuri, **Burundo**
S-ino Miora Ravelohariso n, **Madagaskaro**
S-ro Joel  Muhire Ndaziboneye, **DR Kongo**
S-ro Moses Gbetogo Opa, **Niĝerio**
S-ro Viktor  Ntonto, **Kameruno**
S-ro Adjévi Adjé, **Togolando**
S-ro Cedrick Irakoze, **Kenjo**

Pli da informoj rilate al la afrika movado haveblas per: ***www.esperanto-afriko.org***.